

La nuna situacio de Ido, Occidental kaj Interlingua en Svislando
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-810/266, k38, 1979 aprilo 19, 21

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Fermiĝis tuj post pasko la ekspozicio pri Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando, kiu, dum pli ol tri monatoj, altiris la atenton de la uzantoj de la servoj de la Svisa Nacia Biblioteko en Berno. Kadre de tiu ĉi ekspozicio okazis tri kunsidoj, kiujn organizis, kiel la ekspozicion mem, Kultura Centro Esperantista.

A.- Unue delegacioj de po kvar delegitoj de la diversaj tendencoj interlingvistikaj estis invititaj al kunsido, kies celo estis la kritika ekzameno de la ekspozicio. Fakte nur la esperanto- kaj ido-movadoj povis normale partopreni la aranĝon. La lingvo Occidental havis nur unu reprezentanton kaj la adeptoj de la lingvo Interlingua rifuzis renkonti esperantistojn. Tiu ĉi rifuzo atestas la malforton de la koncerna lingvo. Ni forte dubas, ke en Svislando troviĝas kvar personoj kapablaj paroli la lingvon de Gode, kvankam statistike oni registras por Interlingua en Svislando dudekon da uzantoj. Pri la disvolviĝo de tiu neordinara renkontiĝo interlingvistika ni raportos fine de nia hodiaŭa prelego.

Cl.- Ni unue parolu pri la du aliaj aranĝoj okazintaj en la kadro de la ekspozicio Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando. Por la dua fojo estis kunvokita la kultura komisiono de Kultura Centro Esperantista. Tiu ĉi komisiono konsistas el du specoj da membroj. La membraron A formas la delegitoj de la esperanto-organizoj, kies sidejo troviĝas en Svislando aŭ kiuj havas sekcion aŭ peranton en Svislando. Por la unua fojo Svisa Radio Internacia sendis reprezentanton. La membraron B elektas la Ĝenerala Asembleo de Kultura Centro Esperantista, asembleo en kiu la membraro A havas voĉrajton. La celo de la kultura komisiono estas konsila, kaj decidiĝis ke ĝi kunsidos ĉiujn ses monatojn. Ĝi diskutis kunsidan regularon, kies rolo estas doni prestiĝon al la komisiono mem. Tiu ĉi institucio, kiu grupigas reprezentantojn de ĉiuj organizaĵoj, kiuj uzas esperanton, povus fariĝi inda peranto inter la esperantistaro kaj la kantonaj kaj federaciaj aŭtoritatoj.

A.- La tria aranĝo, kiu disvolviĝis en la Svisa Nacia Biblioteko arigis pedagogojn esperantistajn kaj neesperantistajn. Kunvokis la kunvenon la komisiono "Esperanto Lernejo", fako de Kultura Centro Esperantista. Post atenta vizito de la ekspozicio la tagordo antaŭvidis la ekzamenon de raportoj pri la instruado de esperanto. La aranĝo konkludiĝis per la redaktado de grava rezolucio, kiu, interalie, petas la urbon la Chaux-de-Fonds aŭspicii la sendadon de dosieroj pri la instruado de esperanto al la kantonaj instrudepartementoj en Svislando, instigi instru-eksperimentojn kaj kunvoki internacian konferencon pri la instruado de esperanto en la lernejoj. Ni tutcerte havos la okazon raporti pri la disvolviĝo de tiu ĉi afero, kaj la venontan semajnon ni komencos prelegaron, kiu donos al vi ideon pri la enhavo de la raportoj, kiujn diskutis tiu ĉi kolokvo pri la instruado de esperanto en la lernejoj kaj interalie pri projektoj de instruplanoj por la duagrada lernejoj kaj la gimnazio. Unuafoje en Svislando oni tiel serioze diskutis raportojn de tiu graveco, kaj ni ne konas simil-nivelajn tekstojn. Ĉio tio atestas, ke maturiĝas faktaro, kiu nur povos favorigi la diskonigon de esperanto en la lernejajn mediojn.

Cl.- Ni hodiaŭ revenu al la interlingvistika kunveno. Se ni ĝin komparas kun la aliaj, ni tuj rimarkas, ke ĝia karakterizaĵo estis la maljuneco. Nur la reprezentantoj de esperanto havis la aĝon de profesia okupiĝo. Ĉiuj adeptoj de ido kaj de okcidental estis emerituloj, kaj inter ili kelkaj atingis honorindan aĝon, vekante la admiron de la ceteruloj. Tio ĉi spegulas socian realaĵon. La movadoj idistaj kaj okcidentalistaj ne kapablas plu allogi novajn fortojn. Ili similas al vilaĝoj, kie la novaj generacioj neglektas la lokan dialekton, sed kie la olduloj fidelas al ĝi. Tragika situacio, kiu veku komprenemon.

A.- Konsekvenco de tiu ĉi aĝa konsisto tuj montriĝis. Tiuj ĉi pioniroj de ido kaj de okcidental ĉesis intelektate vivi en la nuneco. Iliaj pensoj kaj rigardoj iras al la pasinteco. Dum la esperantistoj fieras pri novaj libroj kaj laboras al la starigado de novaj institucioj, la idistoj entuziasmas pri kongresoj okazintaj antaŭ duona jarcento. Tiam ilia movado estis vigla, dum hodiaŭ iliaj renkontiĝoj havas nur rememorigan karakteron. La vitrino dediĉita al ido fakte nur povis speguli tiun ĉi fakton, kvankam la ekspozici-organizintoj ĉiel provis trovi almenaŭ kelkajn novajn fotojn. Sed tre simptome estis, ke la idistoj mem ne konsciis, ke ilia vitrino havis antaŭ ĉio historian karakteron. Ili eĉ proponis la prezenton de libretoj, iliaj nuraj eldonaĵoj, kiuj estus nur akcentintaj tiun ĉi aspekton.

Cl.- La diskutoj, kiuj konkludis la vizitadon de la ekspozicio kaj disvolviĝis ĉu en la franca, ĉu en la diversaj planlingvoj, montris, ke la ekspozicio mem atingis sciencan objektecon. Nek la idistoj, nek la okcidentalistoj plendis pri io ilin fuŝe aŭ neobjektive montranta. Ili nur bedaŭris, ke statistika panelo spegulis ilian nunan malforton, kvankam la elektitaj nombroj eĉ iom optimismis. Ili esprimis la deziron, ke tiujn nombrojn oni forigu profite al io alia, sed la diskuto montris, ke la aliaj kriterioj nur povus esti ankoraŭ pli malfavoraj al ili. Se oni prenis la nombron de la eldonitaj paĝoj en unu jaro, ili kvazaŭ neniigis. Se oni raportus pri radio-elsendoj ili ĉesus ekzisti. Ankaŭ la nombro de aranĝoj grupigantaj almenaŭ dekon da partoprenantoj malaperigus ilin el la statistikoj, kaj tiel plu. Fine la proksimuma nombro de nuntempaj praktikantoj tamen montriĝis la por ili malplej malfavora statistikado. Dum tre verŝajne ekzistas en Svislando du lastaj adeptoj de la lingvo Occidental, ĝi ekzemple menciis la nombron de kvin adeptoj por tiu ĉi lingvo. Por Interlingua, kiu tre verŝajne havas ne multe pli ol kvin aŭ ses adeptojn, la statistiko registris dudek parolantojn. Por ido ĝi indikis 25 parolantojn, sed tre verŝajne ekzistas nuntempe en Svislando nur deko da personoj kapablaj sin esprimi en ido. Cetere ankaŭ por esperanto estis malfacile doni ekzaktan nombron, sed la indiko dumil ŝajnas sufiĉe proksima al la realeco.

A.- La diskutoj rapide forlasis la lingvojn ido kaj occidental por la franca, ne pro malbonvolo fare de la esperantistaj reprezentantoj, sed ĉar la idistoj mem kaj la okcidentalisto ne kapablis flue paroli en sia lingvo. Ili hezitis por trovi la taŭgajn vortojn kaj devis esti helpataj de s-ro Tazio Carlevaro, kiu pli bone regis iliajn lingvojn ol ili mem. Tiu ĉi fakto donis penigan impreson kaj nur estus povinta konvinki observantojn pri la teoria sinteno de la kontraŭuloj de esperanto.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!